FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 3 aŭgusto/septembro 1994



Baldaŭ en Lübeck

Pri la foto sur la kovrilpaĝo: Ankaŭ tio estas Lübeck. Unu el la plej imponaj preĝejoj, la dutura rekonstruita St. Marien apud la urbodomo, situanta sur la plej alta punkto de la urbo, preskaŭ komplete forbrulis pro bombatako en la nokto de 29. 3. 1942. La sonoriloj tiam teren falis kaj tie restas kušantja en la preĝejo kiel admona monumento. Vi vidos ili dum la urbgvidado.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion tuj, por ke LKK povu zorgi por adekvata loĝejo.

Se vi alvenos en Lübeck vendredon 7. 10. inter 13a kaj 20.30a horo, vi estos akceptata supre en la granda halo ĉe la elirejo. Atentu la indikojn.

Se vi venos pli frue, veturu al hotelo "acora", Dr-Luise-Klinsmann-Straße 1-3, atingebla per buso n-ro 5, direkto "Moisling", ĝis haltejo "Roter Löwe".

Se vi venos pli malfrue aŭ sabaton antaŭtagmeze, veturu al la kunvenejo, Restaurant "Gemeinnützige", Königstr. 5-7, atingebla per buso n-ro 5, direkto "Eichholz", ĝis haltejo Wahmstraße, de tie 8 min. piede.

IFEF-Kongreso 1995 proksimiĝas

Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) kore invitas siajn membrojn kaj geamikojn al la venonta IFEF-Kongreso, kies organizadon transprenis niaj agemaj hungaraj gekolegoj. Tiu kongreso okazos en la dumiljara urbo Pécs inter la 20a kaj 26a de majo 1995. La kongresurbo situas en la sudo de Hungario proksime al la kroata landlimo. Multnombraj monumentoj atestas pri la eventoriĉa historio de departamenta metropolo. La kongresprogramo akcentas la fervojfakan karakteron, sed ankaŭ anoncas kulturajn, turistajn kaj aliajn allogajn aranĝojn. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) raportos pri la lastjara agado, kaj la komitato determinos venontajn taskojn. Dum la semajno gravos personaj kontaktoj sen lingvaj bariloj. Ni devos demonstri al la publiko, ke Esperanto plene funkcias en konversacioj, fervojaj horaroj, fakprelegoj aŭ kiel tria lingvo de FISAIC.

Pro tio dezirindas multnombraj partoprenantoj. Tial aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Aliĝiloj estas haveblaj per via distriktkomisiito, La prezoj por aliĝo, ekskursoj kaj tranoktejoj estas indikitaj en germanaj markoj. Kiu deziras konatiĝi iom pli kun la vizitinda lando, aliĝu krome al la plurtaga postkongreso. Tiu ĉi komenciĝos en la Puszta-ebenaĵo kaj finiĝos en la ĉefurbo Budapest. La IFEF-Kongreso 1995 kiel kulmino de nia agado proksimiĝas. Hungario atendas vin.

W.B.

Ungarn erwartet uns

Seit 1949 treffen sich die Eisenbahner alljährlich zu ihrem internationalen Esperanto-Kongreß. Die Einladung für das Treffen 1995 kommt von den ungarischen Kollegen. Schon zweimal, in 1962 und 1982, richteten sie mit großem Erfolg eine solche Veranstaltung aus. Auch der 47. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) wird den vorangegangenen Tagungen nicht nachstehen. Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW (GEFA) erwartet

daher, daß wiederum eine stattliche Zahl ihrer Mitglieder und Freunde der Einladung folgen wird.

Wir werden eine Woche lang, vom 20. bis 26. Mai 1995, Gäste in der zweitausend Jahre alten Stadt Pécs sein. In dem von Donau und Drau umschlossenen Landstrich treffen noch heute verschiedene Völker, Nationalitäten und Kulturen aufeinander. Illyrer, Kelten und Römer hinterließen zahlreiche Denkmäler. Mit dem Bau des viertürmigen Domes wurde im 11. Jahrhundert begonnen. In Pécs entstand 1367 eine der ersten Universitäten Europas. Von der 150jährigen Besetzung durch die Türken zeugen heute noch einige Bauten, so die zu einer Kirche umgebaute mohamedanische Moschee. Wir werden diese Sehenswürdigkeiten besichtigen. Heute ist Pécs, bis 1918 auch Fünfkirchen genannt, kultureller und wirtschaftlicher Mittelpunkt des Departements Baranya. Die meisten Teilnehmer aus Deutschland werden mit der Bahn über Budapest anreisen. Die Fahrzeit zwischen Budapest und dem Kongreßort Pécs beträgt etwa zweieinhalb Stunden. Nach Bekanntgabe des Winterfahrplans werden wir die Züge dieser Strecke veröffentlichen.

Unser Esperanto-Kongreß bietet eine Fülle von Veranstaltungen. Ein Höhepunkt ist die feierliche Eröffnung in Anwesenheit von Vertretern des öffenlichen Lebens, der Eisenbahn, der Gewerkschaft und von Esperanto-Organisationen. In Arbeitssitzungen legt der Verbandsvorstand Rechenschaft über seine Tätigkeit ab und legt mit den Delegierten die Richtlinien für die weitere Arbeit fest. Die Öffentlichkeit wird durch eine Pressekonferenz über die Tätigkeit der Eisenbahner-Esperantisten unterrichtet. Einige von ihnen treten in der Uniform ihrer Bahn auf. Andere suchen als Funkamateure den Kontakt mit fernen Kollegen. Eine internationale Kommission legt die Übersetzung von Eisenbahnfachwörtern fest. Ein Fachvortrag befaßt sich mit den Ungarischen Eisenbahnen, dem Berichte über Neuerungen bei anderen Bahnen folgen. Zum Programm gehören weiter auch ein ökumenischer Gottesdienst, ein Folkloreabend, Konzerte und der traditionelle Ball.

Touristischer Höhepunkt ist ein ganztägiger Ausflug in den Süden. In Siklós befindet sich die einzige mittelalterliche Festung der Landes, die die Jahrhunderte unversehrt überstanden hat. In der Nähe zieht die zweitürmige Wallfahrtskirche Máriagyüd zahlreiche Besucher an. Die Region um Villány ist bereits seit der Römerzeit als Weinbaugebiet bekannt. Dort erwartet uns eine zünftige Weinprobe. Den Abschluß bildet ein Besuch der Donaustadt Mohács. Noch heute erinnern Denkmäler an die große Schlacht gegen die Türken im Jahr 1526. Beim Halbtagesausflug fahren wir zunächst in Richtung Budapest. In Mecseknádasd erwarten uns Verkaufsstände mit bemalten und gebrannten Tonwaren. Vielleicht erwerben Sie dort einen der künstlerisch gestalteten Teller. Die Bewohner sind vorwiegend deutschstämmig. Ein weiteres Ziel ist das Dorf Óbánya mit sehenswerten alten Bergwerksanlagen. Uns erwartet ein gastliches Ungarn. Deshalb sollten Sie sich möglichst bald anmelden. Formulare erhalten Sie bei Ihrem Bezirksbeauftragten. Wer Ungarn noch näher kennenlernen möchte, der nehme anschließend am Nachkongreß teil. Dieser führt in die weite Puszta und endet in der Metropole Budapest. Alsdann auf Wiedersehen im Mai 1995 in Pécs!

W.B.

Kelkaj kompletigaj detaloj pri la Kongresloko 1995 kaj pri la postkongreso

Kiel ni povis konstati, LKK sub gvidado de la IFEF-vicprezidanto István Gulyas konsistas al konate bonkvalifikitaj kunlaborantoj kaj garantios denove elstarajn kongreson kaj postkongreson.

Jen legu ankoraŭ kelkajn vortojn pri la kongresurbo Pécs. Jam dum la epoko de la Romana Imperio la regiono pro sia favora klimato estis grava komerca centro. 400 jarojn Pécs estis ĉefurbo de tiu provinco, kiun la Romanoj nomis Panonio.

Multaj diversaj popoloj poste loĝis en Pécs, tiel ke oni trovas tie nomojn turkdevenajn, kroatajn, serbajn, bosniajn kaj ankaŭ germanajn. Eĉ nun en tiu regiono (Baĉka) ankoraŭ loĝas multaj germanlingvanoj. Ties prauloj vivtenis sin per laboro en tieaj minejoj (ĉefe en la montaro Mecsek (Meĉek)) kaj industrio kaj enkondukis germanajn metodojn de vinber- kaj vintraktado. Nun ekzistas multaj fabrikoj en Pécs, i.a. la vaste konata produktejo Zsolnay de belaj majolikaj varoj. Pécs estas la kvara plej granda urbo en Hungario kun 170000 enloĝantoj.

LKK karakterizas la kongreson per jena konstato: "Kiu ne prenas al si la kuraĝon partopreni tiun ĉi kongreson, tiu riproĉu sin mem".

Sed LKK ankaŭ anoncis, ke la nombro de partoprenantoj por la **postkongreso** estos limigita. Pro tio ni jam nun informas pri la allogaĵoj de la postkongreso kaj rekomendas, baldaŭ aliĝi. Ĝi daŭros de 27.5. ĝis 30.5.1995.

Ek de Pécs la unua celo estos la urbo Solt (Ŝolt) en la fama hungara ebenaĵo Puszta. Tie oni havos okazon, ĉeesti ciganan nuptofeston laŭ malnova rito. Unu el la ĉeestantoj havos la ŝancon (sub diversaj kondiĉoj kompreneble) esti nomumata "honora ciganprinco", supozeble cele de apartaj enspezoj.

Saman tagon sekvos veturado al Kecskemét (Keĉkemet), kie arkeologoj trovis postsignojn de homoj jam el la tempo de 3000 jaroj a.K. Nun en la urbo troviĝas gravaj nutraĵfabrikoj. Ĝi posedas pli ol 30 diversgradajn lernejojn, en kiuj ĉiujare ĉ. 20mil lernantoj kaj studentoj estas instruataj. Kaj tre grave: la urbo estas centro de Nacia Parko Kiskunság (Kiŝkunŝag), en kiu oni konservas kaj flegas stepon, marĉojn, sodajn lagetojn kaj unikajn faŭnon kaj flaŭron. Naskiĝis en tiu urbo la konata komponisto Zoltán Kodály. Historie interesaj estas la preĝejo de franciskanoj (13, jc.) kaj la turo de kalvinana preĝejo el la turka epoko (1680). En Kecskemét la partoprenantoj dufoje tranoktos.

La duan tagon ekskurso kondukos al najbara regiono Bugac. Kvankam la faŭno ŝajnas esti magre-malabunda, tamen centoj da admirindaj floroj tie pasigas mallongan vivon. Kaj tie la ekskursanoj ĝuos la timigan galopon de la "Stepa Kvinopo", t.e. kvin fajraj ĉevaloj direktataj de lerta ĉevalisto, kiu staras sur ili. Kaj ankaŭ aliaj spektakloj estos prezentataj. Vespermanĝo okazos en ĉarda (gastejo) apud Kecskemét.

La trian tagon la postkongresanoj veturos unue al la ĉefurbo Budapest, kie okazos rondveturado kaj tagmanĝo. La vidindaĵoj de tiu urbo estas tiom abundaj, ke ni ne povas priskribi ilin tie ĉi. Sufiĉu la konstato, ke per la rondveturado LKK donos grandan superrigardon pri tiu belega urbo.

Posttagmeze la veturado daŭros norden al Szentendre (Sentendre), urbeto sur la dekstra bordo de Danubo kun multaj

vidindaĵoj kaj fama ceramika muzeo pri verkoj de Margit Kovács, tre rekomendinda. Vizitinda ankaŭ estas la subĉiela etnografia muzeo.

Fina stacio estos la pitoreska urbeto Visegrad (Višegrad), 20 Km norden ĉe la danuba genuo kun ruinoj de iama fortikaĵo (13. Jc.). Ankaŭ tiu regiono estis loĝigita jam tre frue de homoj. Oni trovis tombejon el la fer-epoko kaj arkeologiajn postrestaĵojn de gotoj, gepidoj, hunoj kaj avaroj. La Romanoj tie havis gravan garnizonon. En Visegrad finiĝos la programo de la postkongreso per festa vespermanĝo. Alian matenon (30.5.) la busoj reveturos al Budapest, de kie la partoprenantoj povos hejmenveturi - aŭ ankoraŭ private resti.

Gießner

Pagado de kongreskotizoj por Pécs

Se vi volos ŝpari la bankkostojn por unuopaj ĝiradoj, ni aranĝas por vi similan pagmanieron kiel pasintjare. Se vi intencas utiligi ĝin, sendu vian aliĝilon kiel kutime al LKK, sed ekzakte rimarkigu en ĝi, ke kongreskotizon kaj ĉambroperadon (6,00 DM) vi ĝiris al la germana kotizkolekta konto. Ĉi-kaze ĝiru la sumon ĝis plej malfrue 30.11.94 al Hans-Jürgen Riehn, Konto 200664634 Sparda-Bank Karlsruhe, BLZ 66090500 kun indiko pri la celo de via ĝirado, kaj nepre sendu al li kopion de via aliĝilo. Lia adreso: Richard-Dehmel-Str. 3, 67061 Ludwigshafen, Tel. 0621/58 24 43. Kiu aliĝos post 30.12. bv. ĝiri rekte al LKK.

Venontaj IFEF-Kongresoj

Post la antaŭaj artikoloj pri la 47a IFK en Hungario, ni povas informi pri la decidoj de la IFEF-komitato faritaj en Krems. Laŭ ili la 48a IFK en 1996 okazos en Den Haag (Nederlando) kaj la 49a en 1997 en Košice (Kaschau, Slovakio). Pri la jubilea 50a IFK ne jam estas decidite.

Martin Rother im Ruhestand

Mit großem Bedauern müssen wir akzeptieren, daß Martin Rother, der seit 1983 im Hauptvorstand des BSW in Frankfurt/M. den kulturellen Sektor betreute, am 23. 6. 1994 nach seinem 65. Geburtstag in den Ruhestand verabschiedet worden ist. Stets wenn wir ihn brauchten, hatte er ein offenes Ohr für unsere nicht immer einfachen Probleme. Wir danken ihm für seine jederzeit verständnisvolle und freundschaftliche Zusammenarbeit und wünschen ihm einen langen Ruhestand bei guter Gesundheit und mit viel Freude.

Gießner

El la grupoj

Hamburg / Hannover

Komuna ekskurso de partoprenantoj el la distriktoj Hamburg kaj Hannover kondukis 20 personojn la 4an de junio al la gastama domo de nia amiko Werner Heimlich en Soltau (Han). En gaja rondo ni multe babilis pri la kongreso en Krems kaj pri la germana kongreso en Kiel.

Inter ni estis ankaŭ la nova prezidantino de GEA, s-ino Elsbeth Bormann el Hamburg.

Post vizito de la urbo kaj mallonga promenado tra la erikeja pejzaĝo ni ĝuis la komunan kaftrinkadon.

Koran dankon al familio Heimlich pro tiuj belaj horoj.

Böhnke

Ni funebras

Por ĉiam forlasis nin

Kurt Macek (77) Fulda

Dum jardekoj li kunlaboris en la grupo Fulda kaj estis ties longjara revizoro.

Dankon pro lia fideleco. Ni kore kondolencas al la familianoj.

La 28. 4. 94 forlasis nin Hermann Pape, longjara membro de la grupo Soltaŭ (Han.). Li estis inter la fondintoj de la grupo kaj jam partoprenis en la unua jarkunveno de GEFA 1957. La distriktkomisiito de Hannover, W. Heimlich, partoprenis en la entombigo. GEFA kondolencas al la familioj.

Fervojaj novaĵoj

Kiam ektrafikos Transrapid?

Se oni demandas kompetentajn industriajn manaĝerojn, kiam ektrafikos la ŝvebanta Transrapid-vagonaro, ili citas precize la jaron, nome 2004. Antaŭkondiĉo estos tamen, ke la germana parlamento kaj la landa konsilantaro akceptos la decidon de la registaro, konstruigi apartan linion inter la grandurbo Hamburg kaj la ĉefurbo Berlin. Tiu linio konsistos el ŝtalbetonaj traboj kuŝantaj sur samkvalitaj pilieroj. La linio devus esti integriĝebla al la fervojstacioj de ambaŭ urboj. Por la efektivigo ekzistas jam konkretaj planoj. Veturtempo kaj veturprezoj eĉ jam estas konataj.

Dum la parlamento intertempe akceptis la registaran decidon, ankaŭ la necesajn investojn flanke de la ŝtato, la landa konsilantaro rifuzis sian konsenton. Ĉu tiu malakcepto renversiĝos, tio dependos de reakordiganta komisiono. Por la realigo de la Transrapid-transportsistemo ekzistas gravaj argumentoj. Laŭ la asertoj de la industriaj entreprenoj la teknika perfekteco de Transrapid estas atingita. Kio necesas, estas t.n. referenclinio, sur kiu Transrapid transportas pasaĝerojn en regula trafiko. Sen tia linio la transportsistemo Transrapid ne havos ŝancon esti vendata eksterlande. Oni esperas eksporti Transrapid al aziaj landoj kaj precipe al Usono. Multnombraj laborlokoj povus esti kreotaj en la koncerna industrio. Pro tiu motivo la germana registaro pretas financi grandparte la konstruadon de la linio, dum la industriaj entreprenoj volas transpreni la ceterajn kostojn.

La argumentoj de la kontraŭuloj ne estas malpli gravaj. Per samaltaj aŭ eble eĉ malpli altaj investoj la ekzistanta fervojlinio inter Hamburg kaj Berlin povus fariĝi grandrapida ICE-fervojlinio. Ne necesos, tiel la oponantoj, nova transportsistemo, kiu nur malfacile estos integriĝebla al la fervojstacioj. Krome en Japanio oni forte antaŭpuŝas la evoluon de la tiea ŝvebanta vagonaro, tiel ke alkreskos tie forta konkurenco. Krome sen granda financa subteno de eksterlandaj ŝtatoj Transrapid ne estas eksportebla. Cetere la Germana Fervojo, kaze de realiĝo de Transrapid-transportsistemo en Germanio, postulus la reĝimon pri la ekspluatado de la nova linio. W.B.

Bloktrajnoj por duetaĝaj kontener- transportoj

Post trijara elprovado la kanada fervoja kompanio CPRail System kreis novan tipon de bloktrajnoj por duetaĝaj kontenertransportoj. Tia trajno de la "dua generacio" konsistas el unuoj po 10 vagonoj, kiuj inter si firme estas kuplitaj kaj nur ĉe ambaŭ finoj havas aŭtomatajn kuplilojn. La firma interligo en la 10vagon-unuoj konsiderinde malplialtigas la pezon de la vagonoj kaj krome reduktas la laŭlonge efikajn fortojn. La unuaj bloktrajnoj de tiu dua generacio trafikas sur la 342 km longa linio inter Buffalo kaj Binghamton en la usona ŝtato New York.

Pramŝipa trafiko al Skandinavio

En 1993 fondiĝis la privatjure organizita filio de la Germana Fervojo, la Germana Pramŝipa Kompanio Balta Maro (DFO) kun sidejo en Rostock. Tiu ĉi ekspluatas kvar ŝipliniojn al Danlando kaj Svedio. Ĉiutage estas ofertataj 140 forveturoj per 14 pramŝipoj kun la partneroj Danaj kaj Svedaj Ŝtatfervojoj. De post majo aldoniĝis la linio Rostock - Trelleborg, kiu kun prioritato servas la vartrafikon.
El 14,3 milionoj da vojaĝintoj inter Germanio kaj Danio/Svedio uzis en 1993 9,2 milionoj unu el la kvar itineroj de DFO. Tio konformas al merkata kvoto de 64,3 procentoj. Unuavica pramlinio estas la t.n. birdfluglinio Puttgarden - Rodby kun 7,3 milionoj da pasaĝeroj kaj 965 000 personaŭtoj. Sekvas unu miliono da pasaĝeroj kaj 105 000 personaŭtoj sur la plej malnova pramlinio Warnemünde - Gedser. Malpli bone frekventitaj estis la tria linio Saßnitz - Trelleborg kaj la kvara linio al Ronne sur la insulo Bornholm.

Kontener-trajnoj por biero

Ĉiun mardon, pro granda bezono baldaŭ dufoje semajne, kompleta trajno kun bierkonteneroj trafikas por la bierfarejo de "Krombacher Pils" inter Kreuztal kaj Halle. Tio estas 407 km. Tiamaniere dum unu nokto estas transportataj en 36 konteneroj 2450 hektolitroj da biero en proksimume 500 000 boteloj. Sur ŝoseo oni transportas tiun kvanton nur 8 km de la bierfarejo en Krombach al la kontenera stacio Kreuztal kaj 25 km de Halle al la grandvendejo en Weißenfels. Malplenajn botelojn oni simile retransportas. El Weißenfels oni liveras la bieron al Berlin, Dresden, Leipzig kaj Magdeburg.
La "bilanco por la naturo" estas klara: Ĉiusemajne anstataŭ 14400 kamionkilometroj necesas nur 814 trajnkilometroj. La avantaĝa ekonomia rezulto kaj precipe la granda akurateco en la liverado estis decidaj por la firmao elekti la fervojon.

Fonto: Die Deutsche Bahn 12/93

Kiam venos la ŝoseaj monstroj?

Aŭ: Eta kontemplado pri problemo, kiu koncernas nin kaj niajn posteulojn ne nur kiel fervojistojn, sed kiel homojn entute. Ĉiu jam spertis, estante survoje sur ŝoseoj, kiel la homoj en aŭto post aŭto turmentas sin antaŭen. Ĉu normala stato, kiun oni simple akceptu? Kelkaj interesaj ciferoj ilustru la aferon: En 1965 la situacio por fervojo kaj ŝoseo estis preskaŭ egala, nome tiam oni transportis po kilometro 33.6 t fervoje kaj 36 t ŝosee. Ĝis 1988 la evoluo draste malboniĝis malfavore al la fervojo. Nome tiu po km transportis 22 t kaj la kamionoj 55.4 t.
Kial? Dum la sama tempo estis konstruitaj ĉ. 90000 km da ŝoseoj kaj aŭtososeoj, sed malfunkciigitaj 3000 km da fervojaj linioj.
Paralele iam post iam la permesita pezo po kamiono estis plialtigita de 24 al 40 t. Plej forte kreskis la t.n. trafiko de entreprenoj (Werkverkehr), per kiu oni rajtas transporti nur varojn de la entrepreno mem. El tio sekvas, ke ĉ. 40% de tiaspecaj kamionoj reveturas sen kargo.
La Eŭropa Unio planas eĉ pli da ŝosea trafiko. Multaj restriktoj en la "interna merkato" estis nuligitaj. La plivastigo de la tutkontinenta ŝoseoreto estas plifortigata, dum la fervojojn oni ĉefe limigas je linioj por grandaj rapidoj, ĉefe destinitaj por transporto de pasaĝeroj. Kaj oni devas timi la permeson de monstroj por 60 t, kiaj jam trafikas en Skandinavio.
Laŭ studo de asocio "Transporto kaj Medio"

nur en la okcidentaj federaciaj landoj ĉiujare ekestas damaĝoj de ĉ. 45 miliardoj da markoj far la ŝosea trafiko. Tial la Trafikklubo Germanio (VCD) postulas ne nur urĝe transŝovi kapacitojn de ŝoseo al relo, sed paŝojn por atingi trafikevitadon. Ne sole VCD montras tiajn konsekvencojn, sed ankaŭ la ĵus publikigita oficiala jarraporto 1993 de l'Federacia Oficejo por Vivmedio (Umweltbundesamt) prezentas similan rezulton.

Laŭ Harz-Kurier komp. Jogi

ESPERANTO – FERNKURSE

I

ESPERANTO - EINE LEBENDIGE SPRACHE

EINFÜHRUNGSKURSUS

Sie erhalten:
- Lehrbuch
-Tonbandkasette
-7 Lehrbriefe
-briefliche Betreuung
-Korrekturen
-Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

Kosten: 30.- DM

GEFA

II

FORTBILDUNGSKURSUS

KONVERSACIA KURSO

Viele Situationen des täglichen Lebens werden als Gesprächsstoff behandelt

Sie erhalten:
-Lehrbuch
-Tonbandkasette
-15 Lehrbriefe
-briefliche Betreuung
-Korrekturen
-Beratung

Kosten 40.- DM

- leicht und bequem daheim lernen -

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN, IST EIN ERLEBNIS

GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG

Bestellen Sie bei: Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten,
Herrn Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, 67063 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf Konto 953729 Sparda-Bank Frankfurt, BLZ 50090500

Redaktfino por n-ro 4/94 estos la 25. 10. 94
Herausgeber/eldonanto: Bahn-Sozialwerk, Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34, 28199 Bremen
Druck/preso: Druckerei u. Verlag Otto Zander, Lindenstr. 16, 37412 Herzberg am Harz